

La *Movado*

Fondita en 1951 N-ro 679 sep. 2007

komuna organo de:

KANSAJA LIGO de ESPERANTO-GRUPOJ
Sone-higasi 1-11-46-204, Toyonaka-si, Ōsaka-hu, 561-0802

KJUŜUA ESPERANTO-LIGO
Kutii 1597-1, Yamato-tyô, Saga-ken, 840-0202

ESPERANTO-LIGO de TYŪGOKU kaj SIKOKU
Ogonzan-tyô 7-15, Minami-ku, Hiroshima-si, 734-0041

ENHAVO

Movade, gazete, kongrese.....	Redakcio	1	
Pri la kanto "Korderizo"	Osioka Moritaka	2	
Kordeziro	trad. Konisi Gaku	3	
Hajkoj: 17 sezonoj.....	Hiroataka Masaaki	4	
La nefinlegebla Dante.....	Simizu Yûko	5	
Fluo.....	Akira	6	
Mezaĝulo el kaverno	Kaba Toyohiko	7	
Sinmortigo kaj la japana socio ...	Yamaguti Sin'iti	8	
Jokohama UK por mi	Nakatu Masanori	9	
Kiel aĉeti	Kataoka Tadasi	10	
Piktogramoj en japania mapo.....	Aikawa Setuko	11	
Kyôgen: Fungoj	trad. Simatani Takesi	12	
Kvin tankaĵoj.....	Huĝimoto Tacuo	13	
Pri la eldona aktivado de KLEG.....		14	
Enigmo(1).....	9/Enigmo(2).....	15/Enigmo(3).....	16

Por la 92a Universala Kongreso de Esperanto en Jokohamo

Movade, gazete, kongrese

Redakcio

Ĉi tiun numeron de "La Movado" ricevas ne nur ĝiaj regulaj legantoj, sed ankaŭ ĉiuj partoprenantoj de la UK en Jokohamo, kaj ni parolas iom pri nia gazeto.

"La Movado" estis lanĉita en aprilo, 1951, kiel monata organo de la ĵus fondita Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj (KLEG), kaj poste fariĝis komuna por la ligoj en la okcidenta Japanio, kiel vi vidas supre. Ni konstante kaj akurate eldonadas ĝin dum 56 jaroj, kaj la nuna numero atingas 679!


Estas tamen nia kutimo redakti ĝin dulingve, en la japana kaj Esperanto, kaj la japana okupas plej multajn paĝojn en ĉiu numero, kaj multaj el la enhavo temas pri nia agado, informado, lernado, ekzercado kaj tiel plu. Kaj la gazeto estas antaŭ ĉio por la movado, kiel montras la titolo.

Ĉi tiun numeron ni tamen decidis redakti tute

en Esperanto kaj petis niajn membrojn kontribui eseojn pri sia temo. Kaj vi vidas la rezulton. Vi legos diversajn kaj variajn pensojn, opiniojn, raportojn de japanaj esperantistoj pri la nuntempa socio.

Ni invitas vin sendi vian opinion al ni, por ke niaj legantoj sciu opiniojn ankaŭ de homoj en aliaj kulturoj. Tia interŝanĝado certe estas esenca celo de nia movado, ni pensas.

Bv. noti, ke por esprimi nian gratulon al la kongreso ni ornamas ĉi tiun numeron per koloraj bildoj, dum la regulaj aperas modestaj nur per nigra inko.



La bildo montras la parton de la havena kvartalo de Jokohamo, kie okazos la UK.

Lignogravuraĵo de s-ano *Takehana To*, unu el ia plej fruaj membroj de KLEG.

Pri la kanto "Kordeziro"

OSIOKA Moritaka

Jam pli ol du trionoj de japanoj naskiĝis post malvenko de la milito en 1945, ne havas sperton esti celo de la aeratako, kaj rigardas militon en aliaj landoj sur televida ekrano sen timo de sia morto. Kaj ni nun troviĝas antaŭ la reakcia ŝanĝo de la 9a artikolo de la Japana Konstitucio, kiu decidas forlasi militon kiel rimedon solvi internacian konflikton.

Sed, en Hiroŝimo estas iom alie, ĉar ankoraŭ postvivas atombombitaj geavoj, kiuj rakontas, kio okazis fine de la milito. Mi mem en la infaneco vivis sub la aeratako en Tokio, kaj ne forgesas frenezigan teruron de la bombado. Kaj mi nun kantas kanton "Kordeziro" en Hiroŝimo.

*Se de super ni, el la ĉiel' ne falus
minace al ni bomboj, kugloj, misil'*

Ĉe la unua frazo jam ektemas mia koro, kaj mi tuj rememoras scenojn: Freneze tremantaj infanoj sub bombado de Usono en Afganio, Irako, kaj aliaj same kiel mi en la infaneco.

La kanto "Kordeziro" naskiĝis en unu el mezlernejoj en la urbo Hiroŝimo, kiel "Paca Deklaro" de lernantoj en 2002. Oni jam tradukis ĝin en 32 lingvojn, kaj aldonis al la originaj kvar paragrafoj sian propran kordeziron kiel la kvinan. La nombro de tiuj propraj "Kordeziroj", verkitaĵ de lernantoj en 28 landoj atingis preskaŭ mil.

La japana televido NHK enlande kaj internacie elsendis informon pri la kanto kaj ties transnacia eĥo, kaj ankaŭ scenon de mil-membra koruso de "Kordeziro" en Hiroŝimo jarfine en 2005.

La verkadon de la origina teksto fare de lernantoj gvidis ilia instruisto kaj ties kolego. Al la teksto donis melodion ilia amiko. Ili ĉiuj estas kolegoj de mia edzino, kiuj kunlaboras en por-eduka kaj porpaca movado de instruistoj.

La kanto estis disvastigita de instruistoj en Hiroŝimo, poste en aliaj urboj. Post duonjaro,

okaze de internacia konferenco de JEARN (*Japan Education and Resource Network*) en Japanio s-ino Nagata Suwako, instruisto-esperantisto en Kōbe proponis la kanton, kiel la ĉefan temon de la evento en 2003, kaj tio estis aprobata.

Ili rakontis sian deziron pri la tutmondiĝo de la kanto al mia edzino. "Kial ne en Esperanto?" Ŝi demandis kaj proponis traduki la kanton en Esperanton. Laŭ ŝia propono mi tuj komencis esperantigi nur antaŭ semajno de la evento. Mi tradukis helpe de mia amiko, kaj donis al ili mian provizoran tradukaĵon, kvankam la traduko ne estis sukcesa nek adaptiĝis al la melodio.

Do, mi volis havi kanteblan tradukon, por ke esperantistoj en la mondo kantu la kordeziron de lernantoj de Hiroŝimo, kaj petis s-ron *Konisi Gaku* esperantigi la tekston kanteblan laŭ la melodio. La novan tradukon ni havas, kiel vi vidas:

*Se ĉirkaŭe de ni, sur la ter',
ne bruus minace al ni zumo de bombavi'*

Neniam mi forgesas la zumon de bombaviadilo B-29 super mia domo, kiu forbrulis post nia fuĝo, kaj deziras neniam esti celita de bombado, nek helpi la registaron, kies armeo militiri.

Ni donu nian morgaŭon sen milito al gefiloj kaj genepoj en la mondo.



Ceremonio antaŭ la monumento por atombombitaj instruistoj kaj lernantoj, 2005-08-04.

Desegnita de Osioka Taeko.

Kordeziro

(Negai)


poez. Lernantoj de Mezlernejo de Ōzu

(rearanĝita de YAMANOKI Takesi)

muz. TAKADA Ryūzi

trad. KONISI Gaku

♩ = 76



- 1) Se de su - per ni, el la ĉi-el', — ne fa-lus mi - na-ce al ni —
- 2) Se ĉir-ka - ŭe de ni, sur la ter', — ne bru-us mi - na-ce al ni —
- 3) Se mal-su - pre de ni, sub la ter', — ne ku-ŝus mi - na-ce al ni —
- 4) Se nur u - nu - so - la kor-de-zir' — re-a - li-ĝos laŭ ni - a ĵur-pet',



bom-boj, ku-gloj, mi-sil' sed li - broj, ka-je - roj kaj kra-jon',
zu-mo de bomb = a - vi' sed kan - toj kun be - la me - lo-di',
mi-noj kun pul - vo - mas' sed se - moj tri - ti - kaj aŭ de riz',
pa-con por ni - a mond' pri-pe - tos ni el tu - ta kor'.



do — ni tuj li-be - ri - gus nin de mal - sa - ĝa an - taŭ - juĝ', —
do — ni tuj li-be - ri - gus nin de te - ru - ro kaj mal-am', —
do — ni tuj li-be - ri - gus nin de mal - sa - to kaj mal-pac', —
Ĝis ple-nu-mi-ĝo de ni - a pet' ku - ne daŭ-re mar-ŝos ni, —



kaj ba-ta - li jam ĉe - sus ni, vi - vus ni en pac'. —
kaj ni kan-tus ku - ne man' en man' kan - ton de li - ber'. —
kaj di - vi - di ĉi - on pro - vus ni — por bon - far - ta viv'. —
por ke vi - vu ĉi - uj de la mond' pa - ce sen mi - lit'. —

17 sezonoj

HIROTAKA Masaaki

kastelpordego
erodita dum jaroj —
sakurblovado

radseĝo iras
duope babilante;
herboj ekĝermas

dancas etuloj
flirte en verda ombro —
blankaj lamioj

retiriĝo ja —
komenco de la tagoj
ĉiam kun kato

venis hirundoj;
domoj staras laŭvice
kiel antaŭe

ardeo akre
alrigardas kontraŭ mi —
vento trans akvo

ankaŭ hodiaŭ
korbatoj ekster ritmo —
cuj mateno

templo budhana
en silenta pensado;
blanka lilio

buŝon ĉe krano
trinki akvon bruante —
nuboj montaltaj

ombroj de domoj
inunditaj de lumo;
alte plenluno

tra grizaj nuboj
aviadil' sen sono —
venteg' aŭtuna

pompaj florkapoj,
ĉiu en sia poto —
ja krizantemoj

favorata de
naturo; manĝipreta
blanka novrizo

homa figuro
en krepuska obskuro;
sazankaj ruĝoj

tagoj sen gusto,
kaftrinkoj sen aromo —
vintra malico

jam aĉetinte
frandaĵojn por gefiloj;
jarfinaj tagoj


el inter nuboj
momento da sunbrilo —
kamparo neĝa

* blanka lamio = *Lamium album*, herbo el lamiaĵoj

* montalta nubo = kumulonimbuso

* cujo = japana pluvsezono

* sazanko = specio de kamelioj, *Camellia sasanqua*



← blanka lamio



→ sazanko

Vizitu la retpaĝon "Ludanta Luno" (<http://www.vastalto.com/hajko/>) kaj ĝian afiŝejon, kie oni povas afiŝi siajn hajkojn.

Antaŭlego antaŭ la nefinlegebla Dante

SIMIZU Yūko [ŝimizu juuko]

Ordinare en Esperanta literaturo min ne multe interesas la ĝenro t.n. monda literaturo. Monde konataj klasikaĵoj verkitaj en naciaj lingvoj, kiujn oni entuziasme tradukis jam en diversajn lingvojn... Multaj el ili restas nelegitaj kun la penso: "Iam ajn, kiam mi volos, mi povos legi nacilingve". Jes, nacilingve. Mondfamajn ĉef-verkojn, kiuj estas jam tradukitaj en la kutiman nacian lingvon kun suplementaj eksplikoj, mi ne facile ekemas pene legi en Esperanto, ne-gepatra lingvo.

Do, kiel esperantistoj ekvolas aĉeti tiajn librojn jam legeblajn en naciaj lingvoj? Kredeble neniu dubas indecon eldoni tradukojn el grava mondliteraturo, sed kiam mi pensas en la situacio de aĉetanto, ofte leviĝas tia demando. Se mi devus pagi por libroj, mi pli ŝatus aĉeti originalajn aŭ rarajn verkojn, kiujn mi ne povos vidi nacilingve.

Mi nun pensas pri ĉi tia demando, verdire ĉar mi lastatempe aĉetis "La Dia Komedio" de Dante. Ne unue Esperantan. Mi aĉetis unue du japanajn tradukojn klasikstilan kaj pli novstilan. Mi anticipe pensis, ke tio sufiĉos por ĝui legadon, sed baldaŭ mi mendis Esperantan kompletan version de *Enrico Donde* (Fonto, 2006), kiam mi ricevis la anoncon de libroservo. Nu nun ĉe mi estas entute tri Inferoj, tri Purgatorioj kaj tri Paradizoj.

Mia intereso pri La Dia Komedio ekestis en la lasta februaro, kiam mi neatendite donace ricevis de ĉina esperantisto libron de *Hu Guozhu*, "Senfina honoro, senfina adoro, nefinlegebla Dante — Dante sub rigardo de ĉina esperantisto" (Verda Stepo, 2006) verkitan dulingve en la ĉina kaj Esperanto. Ĝi konsistas el du artikoloj, fragmentoj el La Dia Komedio kun ĉina traduko, kaj la postparolo kun suplemento de la redaktinto Li Sen. La unua artikolo "Senfina honoro, senfina adoro" prezentas ĉinajn anekdotojn pri la verkoj de Dante. La dua estas recenzo "Nefinlegebla

Dante — Purgatorio sub ĉina rigardo" lastjare aperinta en "La Gazeto".

Komence mia intereso estis ne profunda: "Ho, 'Dante' skribiĝas tiel en ĉinaj ideogramoj!"; "Aha, 'Dia Komedio' skribiĝas tute same kiel en la japana!". Kiam kunestas du lingvoj ideograma kaj latinida, miaj okuloj nature turniĝas unue al la ideograma lingvo. Sekvis scivolo: Se ĝia titolo skribitas en la samaj ideogramoj inter la du lingvoj, ĉu tiu koincido okazis hazarde aŭ konsekvence en la ideogramaj kulturoj? Kiu unue nomis ĝin tiel ideograme? Do aparte min interesis "Senfina honoro, senfina adoro", kiu eksplikas, kiel La Dia Komedio ekiris en Ĉinion.

Instigite de lia ekspliko, mi baldaŭ komencis guglumi por serĉi, kiel ĝi unue envenis en Japanion. Estis *Mori Oogai* (1862-1922), kiu en Japanio unue ekuzis la ideograman titolon de La Dia Komedio. Ĝi aperis en romano de *H. C. Andersen*, "La improvizisto", kiun *Oogai* enjapanigis el la germana inter la jaroj 1892-1901. K.t.p., k.t.p. *Guozhu* taksis La Dian Komedion nefinlegebla. Mi nun, antaŭ ol zorgi pri la nefinlegebleco, demandas min, ĉu mi povus fini mian intereson pri ĉirkaŭaj historioj.

Ja mondaj klasikaĵoj estas fonto de senfina kreado de homoj. Mi rekonis tion, kiam mi foliumis paĝojn de la japanaj versioj. *Hu Guozhu* verkis pri la ĉinaj anekdotoj rilate al la verkoj de Dante, okaze de la 91-a UK en Florenco, en ties lando. Mi verkas ĉi tiun eseon okaze de la 92-a UK en Jokohamo. La kongresa temo estas "Okcidento en Oriento: akcepto kaj rezisto". La Dia Komedio el la okcidenta katolika mondo — italecaj esprimoj (laŭ mi) estas foje agrablaj, foje malagrablaj kun dubinda etiko. La recenzo de *Hu Guozhu* inspiris al mi la person, ke Dante povas esti taŭga materialo por pripenzi la kongresan temon.



guglumi: uzi la retan serĉilon Google.

Fluo

Akira

Apud la riverbordo kunligiĝis multaj boatoj. De tempo al tempo grupo da turistoj alvenis kaj veturis malsupren sur la rivero per la boato, kiun lerte kondukis sunbrunaj kaj fortikaj ŝipistoj. La boatoj revenis per granda kaj kvarangula velo streĉigita de vento. Kiam ne estis oportuna vento, ŝipistoj perŝnure tiris supren la boaton kontraŭ rapida fluo. Ni, infanoj, ludis, petolis kaj naĝis sub la brilanta suno. La riverbordon plenigis nia ĝojkria bruo. Blua ĉielo, malhelverda montaro, blankaj veloj ja restas en mia memorbildo el malproksima somero.

La rivero *Kisogawa* estas unu el la grandaj riveroj en Japanio. Ĉe la meza fluo de la rivero troviĝis la urbo *Ōta-tyō* [oota-ĉoo], nuna *Minokamo-si*, kie mi naskiĝis kaj kreskis. La urbo havas longan historion kiel staciurbo de malnova ĉefvojo *Nakasendō*.

La rivero, de *Ōta-tyō* ĝis la urbo *Inuyama-si*, havas belan pejzaĝon, kiun oni nomas "*Nihon-Rain*" (Japana Rejno) kompare kun la rivero en Eŭropo. La malsupren-navigo sur la rivero ankoraŭ nun estas unu el la turismaj eventoj en ĉi tiu regiono.

Laŭ la rivero troviĝis alta teraso borderita per altaj ŝtonmuroj, kiujn konstruis praloĝantoj por konservi siajn terenojn. Inter la teraso kaj la kutima fluo estis vasta spaco sablo- kaj ŝtonriĉa. El tiu spaco oni portis hejmen pezajn ŝtonojn taŭgan por peklado.

Rivero Kisogawa



Kiam multe pluvis en la almonta regiono, la riverakvo multiĝis kaj fariĝis koto-bruna, sed kutime ĝi estis tre klara. En la jaro 1953, kiam mi estis dekjara knabo, mi kaj miaj samlernejanaj tendumis apud la rivero. La tendumejo, kiu troviĝis tuj supre de mia urbo, ne havis akvo-kondukilon. Sed la akvo de la rivero estis tiel pura, ke ni kuiris per ĝi.

La rivero estis nia ludejo ne nur somere. Ni kaptis fiŝon kaj konkulon, elfosis dolĉetan radikon. Tiuj estis raraj manĝaĵoj, ĉar ankoraŭ estis mizera periodo postmilita.

Estis ne tre sekure ludi aŭ naĝi en fluanta akvo. Mi, mallerta naĝanto, ne povis transnaĝi la riveron. Se ni naĝus, kiam la akvo multiĝas, ni devus riski eĉ nian vivon. En serena tago post pluvaj tagoj ni ofte vidis ĉe la riverbordo ruĝan flageton sur longa stango, kiu informas malpermeson de naĝado kaj multe senkuraĝigis nin.

Sub la teraso troviĝis kelkaj fontoj. La elfluanta akvo estis tre pura, kristale klara, malvarmeta en somero, varmeta en vintro kaj bongusta. Somere oni malvarmigis fruktojn, ekz. akvomelonojn, melonojn, pirojn k.t.p. en la akvo. En la malsupro de la fonto troviĝis kelkaj kuvoj, kie oni lavis siajn vestaĵojn. Ĉirkaŭ la kuvoj multaj virinoj kuniĝis kaj babilis.

En la jaro 1959, mi fariĝis lernanto en supermezlernejo, kaj devis vizitadi lernejon neproksiman je pli ol unu horo per trajne. Mi nature malproksimiĝis de la river-ludoj. Tiutempe Japanio rapide progresis ekonomie. La boatojn oni jam transportis per kamiono. La ekonomia progreso grave malpurigis, eĉ venenis nian vivo-medion. La akvo fluanta el la fontoj fariĝis maltaŭga por trinki. Post kelkaj jaroj mi, studento de universitato, staris apud la rivero, kiu malĝojige surprizis min pro sia malpureco. La ŝtonojn en la fundo de la rivero kovris glueca putroŝlimo. Neniu ludis ĉe la rivero.

En la jaro 1983 okazis granda inundo, kiun ĉefe kaŭzis fuŝo de la akvo-ordigado ĉe digoj en la supra fluo. Post la inundo oni konstruis grandan

Mezaĝulo el kaverno

KABA Toyohiko

En la jaro 2004 aperis libro kun kurioza titolo "Mezaĝulo el kaverno". La aŭtoro forlasis sian hejmon ĉirkaŭ en 1959, kiam li estis 13 jaraĝa. De post tiam li sola vivis unue en montoj, poste en ĉirkaŭaĵo de urbetoj, kaj fine revenis nian socion en 2003. En la libro li skribis pri sia travivaĵo dum tiuj kvardek kelkaj jaroj.

Mirinda estas lia vivado en montoj. Ĉar mi naskiĝis en vilaĝo inter montoj, mi bone konas, kio estas monto. Tie oni povas pasigi kelkajn noktojn. Kompreneble troviĝas manĝeblaj herboj, fruktoj kaj insektoj. Mi tamen sentas, ke la kvanto de tia manĝaĵo malsufiĉas por subteni homan vivon dum longa tempo, precipe en vintra sezono. Sed li pasigis kelkajn jarojn en la norda parto de Japanio, kie estas kovrita de densa neĝo en vintro. Kaj li eĉ diris, ke abundis manĝaĵoj en la montaro.

Li naskiĝis kiel la kvara filo en malriĉa familio kun gepatroj kaj entute 8 infanoj. La patro ofte kruele traktis kaj batis lin, interalie kiam li ŝtelis manĝaĵon pro malsato. Pro la neeltenebla trakto li forkuris en la monton, kaj post du tagoj sekvis lin la familia hundo amata de li. Tiel komenĉiĝis lia malfacila vivo kun la hundo.

Lia unua loĝejo estis en kaverno de forlasita minejo. De sia domo li forportis hakilon, alu-meton, salon kaj sekigitan bataton. Tuj elĉerpiĝis la batato, li ekmanĝis sovaĝan persimonon, helikon, insekton, serpenton, raton, vesperton, ranon, fungon, sovaĝan legomon, leporon, kaj eĉ apron. Por kapti apron, li fosis grandan truon, ene metis akritajn bastonojn, poste elvenigis apron. La ekscitita apro postkuris lin, kiu transsaltis la

muron el betono ĉe la teraso. La nova muro forigis malnovajn ŝtonmurojn kaj puŝpreme detruis kelkajn fontojn. Nun la betona muro staras digna kaj kvazaŭeterna.

truon, sed ne la apro.

Antaŭe en Japanio troviĝis nemalmulte da homoj solaj vivantaj en montaro. La fama folkloristo kaj esperantisto, YANAGITA Kunio, kolektis multajn folklorojn pri ili. Iuj el ili vivis tute nudaj, manĝante ranon aŭ insekton. En mia juneco mi aŭdis, ke en la ĉirkaŭaĵo de mia hejmo ankaŭ estas viro sola vivanta en monto. Li tamen ne perfekte rompis rilaton kun la homa socio. De tempo al tempo li aperis en la vilaĝo, aĉetis necesajn aĵojn kaj reiris al la monto. Oni diris, ke li havas deponitan monon.

Kontraŭ la viro, la mezaĝulo vivis tute sola en la monto. Konsternis min lia scio pri la naturo, kaj lia vivpovo ankaŭ estas mirinda. Li sciis: Kiel fari domon kaj liton? Kiuj estas manĝeblaj en monto? Kiel manĝi ilin? Li eĉ kuracis sin de sia alta febro uzante karbigitan lumbrikon. Ĝi certe estas unu el tradiciaj medikamentoj. Ĝis la aĝo de 13 jaroj, li jam lernis sufiĉan scion por vivi sola en la naturo.

Povas esti, ke antaŭ kelkdek jaroj multe da japanoj ĝenerale havis tian scion. Mia avo, naskita en 1902 kaj forpasinta en 2002, ankaŭ estis unu el tiaj homoj. Kiam mi estis studento, en ĉiuj somera kaj vintra ferioj mi reiris mian vilaĝon kaj ripete intervjuis lin pri la historioj de nia familio kaj pri la vilaĝo. Je mia surprizo, lia memoro konsistas ne nur el tia historio, sed ankaŭ el vasta scio pri la naturo. Dank' al li, mi povis listi drogherbojn, manĝeblaĵojn kaj aliajn.

Tre bedaŭrinde nuntempe oni jam ne bezonas tian scion, kiu sendube apartenas al la malnova etapo de nia socio. Ĉe mi troviĝas kvin kajeroj el mia intervjuado kun la avo. Kiam mi rigardas ilin, mi forte sentas, ke la scio de mia avo konsistigas alian kulturon ol la nian, kaj mi mem eterne perdis ŝancon plu lerni ĝin. Sed restas neniom da elekt-ebleco por ni ĉiuj.



Dokudami (*Houttuynia cordata*): tipa drogherbo

Sinmortigo kaj la japana socio

YAMAGUTI Sin'iti [jamaguĉi ŝin-iĉi]

En Japanio ĉiujare pli ol tridek mil homoj sin mortigas. Tiu ĉi nombro estas multe pli granda ol tiu de mortintoj pro trafika akcidento.

Laŭ la dokumento publikigita de la Buroo pri Polico, antaŭ 1998 la nombro de sin-mortigintoj neniam superis tridek mil, kaj post tiam male ĝi neniam malsuperis tridek mil. Se citi precizan ciferon, en 1997 sin mortigis 24,391 (proporcio kontraŭ cent mil loĝantoj: 19.3) kaj en 1998 sin mortigis 32,863 (proporcio same: 26.0). Multiĝo estas ĉi tiel subita. Cetere en 2005 sin mortigis 32,552.

Tre bedaŭrinde ni ankoraŭ ne trovis efikan kontraŭrimedon por preventi sinmortigon. Kvankam oni faris la bazan leĝon por preventi ĝin en la lasta jaro, estas dubinde, ĝis kioma grado la leĝo havos efektivan povon.

Se kompari la proporciojn de sinmortigintoj en diversaj landoj, ni notas, ke Japanio okupas la unuan lokon el la sep progresintaj landoj (G7, grupo 7) kaj la duan lokon post Hungario el la landoj apartenantaj al OECD (Organizaĵo por Ekonomia Kooperado kaj Disvolvado).

Landoj, kie proporcio de sinmortigo estas alta, plejparte troviĝas en la Orienta Eŭropo; ili estas ekssocialismaj landoj. Laŭ la statistiko de WHO (Monda Organizaĵo pri Sano), se kompari la proporciojn de sinmortigintoj en 2003, la unuaj dek landoj estas jenaj (de supre): Litovio, Rusio, Belorusio, Kazaĥio, Slovenio, Hungario, Estonio, Ukrainio, Latvio, kaj jen Japanio.

Kial la proporcio en ekssocialismaj landoj estas alta? Oni konjektas, ke disfalis la socia sistemo garantianta egalecon, homoj komencis serĉi materialan profiton kaj subite ekestis fendo inter sukcesintoj kaj malsukcesintoj. Do malsukcesintoj — disfalintoj suferas pro sia "malfeliĉo", komparante sin kun sukcesintoj. Tiu ĉi situacio estas



sama kiel en Japanio.

En Japanio, kvankam ĝi politike ne estas socialisma, ne troviĝis malriĉeguloj nek riĉeguloj. Iuj sarkasme diris, "Japanio estas la sola socialisma lando sukcesinta."

En Japanio, post kiam "bobela ekonomio krevis" en 1990, daŭras malforta konjunkturo en kompleksa fazo. Tio estis konsekvenca rezulto de la forta konjunkturo sen bazo. Ĉiuokaze entreprenoj komencis provi restaŭri sin, maldunginte laborantojn.

Se kompari la nombron de sinmortigintoj laŭ jaraĝaj tavoloj, ni ekscias, ke la plej altan proporciojn montras kvindekjaraĝuloj kaj ilin sekvas kvardekjaraĝuloj kaj sesdekjaraĝuloj. Kaj se temas pri motivo, kvankam sinmortigo pro "sanproblemo" estas la plej ofta, ties efektivaj nombroj ne tre multe ŝanĝiĝas dum la lastaj dek jaroj. Kontraste al tio, sinmortigo pro "ekonomia (vivtena) problemoj" draste multiĝis; en 1989 ties nombro 1,396 (proporcio: 6.2) kaj en 2003 nombro 8,897 (proporcio: 25.8). Per tiu ĉi fakto estas klare, ke la multiĝo havas fortan ligon kun la ekonomia problemoj.

Memkompreneble maldungitoj tuj alfrontas vivtenan krizon. Sed tio ĉi ne faras la ĉefan, almenaŭ la solan, kialon. Japanio havas la sistemon de vivprotektado, kaj ekstreme malmultaj, se ne diri neniam, mortas pro malsato. Esence kvalita ŝanĝiĝo de japana socio donas gravan influon sur vivstilon de japanoj. Nome la nuna japana socio estas tro severa al homoj.

En ĝi ekonomia profito faras la ĉefan punkton de valorokriterio. La vortoj "venkintaro" kaj "venkitaro", kiuj estas ofte uzataj lastatempe, tipe simbolas tian valorokriterion. En tia socio estas malfacile por multaj homoj vivi, escepte de

Jokohama UK por mi

NAKATU Masanori

La 31an de julio 2004, en la Solena Fermo de Pekina UK la prezidanto de UEA, d-ro *Renato Corsetti* publikigis en la ferma parolado, ke post tri jaroj la semajna centro de Esperanto-movado revenos al Azio, nome al Jokohamo. Kiam mi aŭdis la anoncon en aplaŭdoj de la ĉeestantoj, nebula ideo venis al mia kapo, ke mi iel laboru volontule por la kongreso, kiel japana esperantisto.

Mi estas en Esperantujo jam pli ol tridek jarojn de post mia esperantistiĝo, dume mi korespondadas kun kelkaj eksterlandaj esperantistoj, laboras por Esperanto-movado, kvankam nur en loka societo, partoprenas kongresojn regionajn, landajn kaj kelkfoje universalajn, ktp. Tia esperantista vivo faris mian spiriton riĉa, al mi ŝajnas. Eble mi pensis, ke profitante la okazon de Jokohama UK mi devas rekompenci Esperantujon per mia povo, ekzemple labori volontule.

En januaro de 2004 mi emeritiĝis kaj havas tempon. Des pli tio igis min havi la ideon, mi pensas.

Pasis tri jaroj post la Pekina UK kaj mia nebula volo pli kaj pli proksimiĝas al la realiĝo, ĉar mi anoncis min al la varbado de voluntuloj por Jokohama UK.

Tiel mi havos tri laborojn.

malmultaj sukcesintoj kaj riĉeguloj. Alivorte la japana socio devigas japanojn teni tro pezajn strebadojn kaj paciencon. Multaj laborantoj mense kaj korpe malsaniĝas pro tro da laboroj kaj da stresoj en sia laborejo, estas atakitaj de depresio kaj finfine preferas sinmortigon. Tial la lastatempa multiĝo de sinmortigo ne estas simple individua sed socia problemo. La nuna registaro havas respondecon moderigi kaj mildigi eks-ternorman impeton de kapitalismo.

La unua laboro estas akompani la aliĝintojn al Antaŭkongreso-2 kiel interpretisto de japanlingva profesia ĉiĉerono de turisma agentejo, kiu aranĝos la ekskurson. Oni vojaĝos kvar tagojn vizitante la urbojn Hiroŝimo, *Okayama* [okajama], *Himezi* [himeji] kaj Kioto.

La 31an de julio la ekskursantoj kolektiĝos ĉe Narita Internacia Flughaveno proksima al Tokio, kaj en la unua tago vizitos Hiroŝimon konatan kiel la unua atombombita urbo en la mondo, kaj en la postaj tagoj vidindaĵojn en la aliaj urboj.

La dua estas deĵoro ĉe la kongresa ĝiĉeto en la unuaj du tagoj. La laboro estas facile imagebla por mi, ĉar mi ofte vidis, kiel oni laboras ĉe ĝiĉeto en UK-oj kaj enlandaj kongresoj.

La tria estas ĉiĉerono en Duontaga Ekskurso-7, kies aliĝintoj ekskursos al *Sankeien* k.a. en Jokohamo.

Mia bulgara korespondanto diris, ke la laboroj certe aldonos bonajn spertojn al mia vivo. Verdire mi atendas, ke en la laboroj mi povos praktiki Esperantan interparolon plej multe en mia vivo esperantista.



Enigma (1)

JAMASAKI Motohiro

Ĉar la 92a UK okazos en 4-11, aŭg., 2007, jen liter-cifera problemo:

$$LA / (92A - UK) = (4 - 11 + AŬG) / 2007$$

Atribuu al ĉiu malsama litero malsaman ciferon el 0, 1, ..., 9 por ke la kalkulo estu ĝusta. Atentu, ke la unua litero de ĉiu litervico ne povas egali al 0, kaj ke 92A estas tricifera nombro, ne 92-obla A.

Ekzistas nur unu solvo.

Kiel aĉeti?

KATAOKA Tadas

Lastatempe dum multiĝas grandegaj memservaj magazenoj, pli kaj pli malaperas malgrandaj vendejoj proksime de mia domo. Por mi, blindulo, estas tre malfacile fari aĉetadon en tiuj memservaj vendejoj. Antaŭe mi povis facile aĉeti necesajojn en najbaraj malgrandaj butikoj, interparolante kun la vendistoj.

En grandaj memservaj vendejoj mi devas mem serĉi aĵojn, kiujn mi volas aĉeti, el multegaj varoj. Tio estas preskaŭ ne ebla por mi. En iu memserva vendejo, se blindulo anticipe petas helpon de la vendejo, ĝia vendisto akompanas, kaj helpas ties aĉetadon. Tamen bedaŭrinde preskaŭ ĉiuj memservaj vendejoj ankoraŭ ne donas al ni tiun servon.

Tial, por aĉeti manĝaĵojn kaj aliajn ĉiutagajn aĵojn mi uzas servon de kooperativo de konsumantoj. Ĝi liveras menditajn varojn al mia domo unu fojon en semajno, kaj tiam donas al mi sursonbendigitan katalogon de varoj liverotajn venontsemajne. Aŭdinte la sonbendon, mi brajle notas numerojn de varoj, kiujn mi volas mendi, kaj mi petas vidanton skribi ilin en la mendilo.

Tiel aĉetinte, tamen aperas alia problemo: Kiel distingi la aĵojn, precipe frostigitajn manĝaĵojn? Unue kio estas tio? Fiŝaĵo aŭ viando? Kiamaniere kuiri? Friti aŭ varmigi en varma akvo? Kaj tiel plu. Nenian informon pri tio oni brajle skribas sur la varoj.

Lastatempe tamen por solvi la problemon aperas oportuna aparato. Ĝi konsistas el malgranda skanilo de IC (integrita cirkvito)-etikedo kaj voĉ-parolio. Ricevinte menditan varon, blindulo petas vidanton registri informon de la varo en IC-etikedon kaj glui ĝin sur ĉiun. Kiam blindulo volas scii pri la aĵo, tiu skanas ĝin kaj la aparato voĉlegas la registritan informon, kvazaŭ la varo parolas. Tiamaniere la blindulo mem

povas serĉi sian deziratan manĝaĵon kaj scii, kiamaniere kuiri ĝin. Ankaŭ estas simila malpli kosta aparato per stri-kodo.

Aĉeti per reta servo estas ankaŭ mia plezuro. Antaŭ ĉirkaŭ 20 jaroj oni fondis datumbazon de brajligitaj libroj nomatan *NAIIV Net* helpe de *IBM*. Volontuloj por brajligo, kiuj loĝas dise, sendas brajligitajn datumojn al *NAIIV Net*. Blinduloj-membroj de tiu reta servo, restante en sia domo, povas elŭti dosieron de elektita libro en sian komputilon, per kiu ili povas legi. Nun en la bazo troviĝas pli ol 60000 titoloj de brajligitaj libroj, kaj ĉiusemajne aldoniĝas pli ol 100 novaj titoloj. Kompreneble ankaŭ Esperantaj libroj troviĝas inter ili.

Antaŭ kelkaj jaroj tie mi trovis unu libron pri teo. En la libro troviĝis retadreso de la aŭtoro. Mi skribis retleteron al ŝi, kaj povis aboni ŝian senpagan retgazeton. Nun mi facile mendas favoratajn teojn, leginte la retgazeton. Tiel mi ĝuas bonan teon dank' al la reta servo.

Cetere, mi nun uzas la retan libroservon de *Amazon*. Tie oni vendas tre diversajn librojn, kaj sendas la menditajn librojn al mia domo. Tio estas tre oportuna servo por mi.

Tamen denove aperas alia **problemo**: kiamaniere mi legu aĉetitajn librojn? Kiel vi scias, en *Amazon* troviĝas neniu brajligita libro. Kiel unu el la provoj senigi barilojn kontraŭ handicapitoj, iuj el eldonejoj donas komputile legeblajn dosierojn de la aĉetita libro al blinduloj. Nevidantaj abonantoj de ĉi tiu gazeto "*La Movado*" povas rete ricevi ankaŭ la teksto-dosieron de ĉiu numero, kaj mi legas ĝin per mia komputilo. Tio estas tre bona helpo, mi pensas. Sed bedaŭrinde preskaŭ ĉiuj eldonejoj ankoraŭ ne donas tiun servon.

Jen estas mia maniero de aĉetitaj libroj: Mi petas volontulojn voĉlegi facilajn librojn, kaj brajligi malpli facile kompreneblajn, kiun mi devas atente legi.



Piktogramoj en japania mapo

AIKAWA Setuko [aikaŭa secuko]

En mapo oni foje uzas piktogramojn.

Piktogramo estas signo per bildo, kiu montras ian aĵon aŭ agon. Ekzemple por montri fumadon oni uzas bildon de cigaredo kun leviĝanta fumo. Se estas ruĝa oblikva linio desegnita sur la cigaredo, la bildo montras malpermeson de fumado. Mi ne scias, ĉu tiu piktogramo estas internacie uzata aŭ ne, sed ĉiuj povas kompreni, pri kio ĝi temas.

Ĉi tie mi montras kelkajn piktogramojn uzatajn en mapo en Japanio.

Bildo 1 havas formon de malfermita libro. Vi povas facile diveni, kion ĝi montras en mapo. Jes, ĝi estas signo de biblioteko.

Bildo 2 havas formon de domo kun dikaj kolonoj. Ĝi montras muzeon.

Bildo 3 estas pli malfacila. Ĝi estas romboforma signo kun streketoj ĉe du anguloj. La signo estis dezajnita laŭ formo de bido de kalkulilo, simila al abako (japane: *soroban*). Kian kon-

struaĵon aŭ lokon ĝi montras? Ĉu banko? Ne. Ĝi estas signo de oficejo pri impostoj. Impostistoj longe kalkulis per tiu kalkulilo, sed nun ili uzas komputilon.

Bildo 4 estas pli facila. La kruco simbolas hospitalon en Japanio.

Bildo 5 estas nova piktogramo, kiun oni ekuzis en 2006. En domo estas bastono por faciligi paŝadon. Ĝi montras domon, kie maljunuloj loĝas kaj estas flegataj.

Bildo 6 estas "torii", simbolo de templo ŝintoisma. Tra "torii" homoj eniras en sanktan terenon.

Bildo 7 estas svastiko. Svastiko estas signo deveninta de Barato, supozeble de hinduismo. En Japanio ĝi estis uzata kiel signo de bono kaj feliĉo en Budhismo. Budhismo alvenis al Japanio en la 6-a jarcento ne rekte el Barato, sed tra Ĉinio kaj Koreio. Supozeble estas, ke la signon oni uzas vaste en la orienta Azio. En japania mapo ĝi montras budhisman templon.

Vizitantoj al orienta Azio ne estu surprizitaj trovante la signon similan al la hokokruco, kiu simbolis naziismon. Azianoj uzadas ĝin dum miljaroj kiel sanktan kaj feliĉigan signon. Kompreni tio tute ne koncernas naziismon.



Bildo 1



Bildo 2



Bildo 3



Bildo 4



Bildo 5



Bildo 6



Bildo 7

"Kroniko Japania" rete legebla

"Biblioteko Sakura" estas projekto por enretigi senkopiratajn librojn, kiuj iam estis eldonitaj en Japanio. Ĝiaj membroj volontule skanas, tajpas, revizias kaj enpaĝigas. La unua frukto estas "Kroniko Japania Vol.1", kies japana originalo *Nihon-syoki* publikiĝis en la jaro 720.

Kvankam ĝi portas la subtitolon "oficiale verkita nacia historio", fakte la unua volumo estas kolekto de mitoj kaj legendoj. Vi povas legi ĝin ĉe retejo: <http://www.vastalto.com/librejo/>

Koresponda Servo

Internacia Fakoj de KLEG aktivas ankaŭ kiel Japania Esperanto-Korespondo-Servo. Se vi volas havi leteramikojn en Japanio, skribu al ni preslitere pri viaj nomo, adreso, aĝo, sekso, familio, profesio, ŝato-okupoj kaj ankaŭ deziroj pri via korespondonto. Ni aperigos vian peton en ĉi tiu gazeto kaj donos vian leteron al tiu, kiu proponas sin korespondi kun vi. Japania Esperanto-Korespondo-Servo, KLEG, Sone-higasi 1-11-46-204, Toyonaka-si, Ōsaka-hu, JP-561-0802

Fungoj

tradukis SIMATANI Takesi
el "Kusabira" de Yamamoto Azuma

Viro: Mi estas loĝanto en ĉi tiu loko. Antaŭ kelkaj tagoj en mia korto elkreskis fungoj. Mi forigis ilin. Dum la nokto ili tamen reaperis. Mi forigis ilin, sed ili reaperis ĉiam pli kaj pli grandaj. Ili jam teruras min!


Mi konas jamabuŝon tre favoran al mi. Mi iru al la monto kaj petu lin diveni pri la afero kaj preĝi kontraŭ la abomenaj fungoj. Mi iru senhaste. (Li rondiras en la scenejo.) Ĉu la jamabuŝo estas hejme? Mi venas vane, se li forestas. (Ĉe la fino de la ponto, kiu troviĝas maldekstre de la scenejo.) Ha, mi jam atingis la domon. Nun mi alvoku lin. Saluton! Saluton, Via Eminentaj Jamabuŝo! Ĉu vi estas hejme?

Jamabuŝo: (Ĉe la alia fino de la ponto li recitas.) Antaŭ la fenestro de Naŭ via Sensoj, sur planko de Dek Observoj, kun sankta akvo de Jogo kaj sub la Luno de Tri Sekretoj... Kiu venis?

Viro: Jen mi venis, Via Sankta Jamabuŝo!

Jamabuŝo: Vi rajtas eniri sen peto. Por kio vi vizitis min?

Viro: En mia korto elkreskis fungoj. Mi forigis ilin. Dum la nokto ili tamen reaperis. Mi forigis ilin, sed ili reaperis ĉiam pli kaj pli grandaj. Bonvolu veni al mi, mi petas, por diveni la aferon kaj preĝi kontraŭ la abomenaj fungoj.



Noa teatro, en kiu oni ludas ankaŭ Kyôgen.
"Ponto" estas koridoreto maldekstra de la ĉefa ludejo.
foto: el la japana retejo de Vikipedio

Jamabuŝo: Nun mi estas okupita de mia ekzercado kaj por neniu alia mi irus, sed por vi mi iros kaj divenos la aferon.

Viro: Elkore mi dankas vin. Bonvolu sekvi min.

Jamabuŝo: Mi sekvos vin. (Ili rondiras.)

Viro: Estas nature, ke aperas fungoj. Ili tamen aperas kaj aperas nedece kaj ĝenas min.

Jamabuŝo: Mi komprenas vin. Estu trankvila! Mi vidos kaj solvos la problemon.

Viro: Elkore mi dankas vin. (Iras sur la ponton kaj revenas al la scenejo.) Ha, ni jam atingis mian domon. Bonvolu enveni, mi petas. (Aperas ĉe fronto de la scenejo fungo kun ronda ĉapelo kaj masko de Oto. Ĝi paŝas kun fleksitaj genuoj.)

Jamabuŝo: Konsentite... Ha, ĉi tie sidas fungo.

Viro: Jen vi vidas, kiel granda ĝi estas!

Jamabuŝo: Vere granda fungo! Nun per fingroj mi divenos pri ĝi: *Tan, Ĉo, Ken, Ro, Gin, Nan, Ba... Gin, Nan, Ba!* Mi trovis, ke tenguo elsorĉis ilin.

Viro: Ho, tenguo elsorĉis ilin.

Jamabuŝo: Mi preĝos kaj forigos la fungojn.

Viro: Elkore mi dankas vin.

Jamabuŝo: Jen preĝas mi, jamabuŝo, disĉiplo de *En-no-Ozunu*. Sur altaj montoj ni esploras la eternan saĝon kaj grandan kompaton. En robo kun rozoj kaj kasajo de toleremo mi portas rozarion ne el ligno, sed el semoj de sovaĝa herbo. Kun tiu ĉi rozario mi preĝos. Kiel povus ne okazi mirakloj! *Boronboro, Boronboro, Boroonbooro!*

Viro: (Foriras la fungo.) Vi faris miraklon!

Jamabuŝo: Jamabuŝoj ekzercas sin kun bivakoj en kampoj kaj montoj. Mi kutimas dormi sur roko kaj arbo. Antaŭ mia forto falas birdo el la aero. Kiom ajn aperas fungoj, ili ne povas ĝeni min.

Viro: Miraklon faris via forto! (Aperas du fungoj.) Jen antaŭ ni aperis du aliaj fungoj!

Jamabuŝo: Vere aperis du aliaj! Ne estas problemo. Mi havas melongenon sigelon, kiun timas fungoj. Kun la sigelo mi preĝos kontraŭ ili.

Viro: Elkore mi dankas vin.

Jamabuŝo: Kiel ajn malicaj estas la fungoj, ili

Kvin tankaĵoj

Tacuo HUGIMOTO

Konsistas nun tre
 Densa konversacio
 Patrino-filino;
 Kromstaranto mi estas:
 Ilia edz' kaj patro!

Nia esper', do
 Al ni alportas ion?
 Ĝi estas esper'
 De la folia verdo,
 Krom tio ja nenion.

Mia tristeco
 Estus kvazaŭ de homo,
 Kiu nun perdis
 La tagan plaĉeteson
 Ĉiame ĉeestantan.

certe pereos de mia preĝo kun la sigelo de melon-
 geno! *Boron-boro, Boron-boro, Boroon-booro!* (Du
 aliaj fungoj aperas.)

Fungoj: Hoj, hoj, hoj, hoj! (Kvar fungoj
 rondiras en la scenejo.)

Viro: Ho, ve! Parolos fungoj! *Terure, terure,*
terure! (La viro forkuras de la scenejo tra la
 ponto.)

Jamabuŝo: (Evitante la fungojn) *Boron-boro,*
Boron-boro, Boroon-booro, Boroon-booro! (Du aliaj
 fungoj aperas.)

Fungoj: Hoj, hoj, hoj, hoj!

Jamabuŝo: *a-bo-co-ĉo-do-e-fo! Boron-boro, Boron-*
boro, Boroon-booro! go-ĝo-ho-ĥo-i-jo-ĥo! Boron-boro,
Boron-boro, Boroon-booro, Boroon-booro! Tro multaj
 ili estas! Mi ne restu ĉi tie! Mi devas forkuri! Mi
 devas forkuri! (De la ponto aperas kvin fungoj.)

Fungoj: Hoj, hoj, hoj, hoj!

Jamabuŝo: (reiras al la scenejo) Kiel multaj ili
 estas! *Boron-boro, Boron-boro, Boron-boro, Boroon-*
booro! (Fungoj kroĉiĝas al li.) Kion vi faras! Ho,

Vivo komuna
 Eĉ dum kvardek kvar jaroj
 Kun la edzino
 Iel kaj tiel daŭras,
 Kaj ĝin mi malbedaŭras.

Nun mi abstinas,
 sed longe ne obstinos,
 ĉar en aŭgusto
 dum Jokohama UK
 nepre oni kundrinkos.



foto: Akira

ve! Pardonu min, pardonu min, pardonu min!
 (Jamabuŝo forkuras. La fungoj sekvas lin en vico.)

Fungoj: Hoj, hoj, hoj, hoj!

Jamabuŝo: Pardonu min, pardonu min,
 pardonu min! (Ĉiuj foriras.)

Jamabuŝo: asketo de ŝugendo, japana monto-
 kulto sinkretisma kun budhismo.

Naŭ Sensoj: vido, aŭdo, flaro, gusto, tuŝo,
 konscio, memamo, personeco kaj vero.

Tri Sekretoj: funkcioj de korpo, buŝo kaj kon-
 scio, kiujn homo ne povas scii.

masko de *Oto*: masko de komika junulino aŭ
 supernatura estaĵo.

kasajo: skapulario por jamabuŝo el maldikaj
 bendoj kun entute ses kvastobuloj.

En-no-Ozunu: la fondinto de ŝugendo.

tenguu: imagita monstro en montaro kun
 flugiloj, ruĝa vizaĝo kaj altega nazo.

Tan, Ĉo, Ken...; Boronboro...; a-bo-co-ĉo ktp.: ĉiuj
 estas galimatiaj vortoj por ekzorcado.

Pri la eldona aktivado de KLEG


Kiam Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj (KLEG) komencis sian agadon en 1951, ĝi samtempe komencis eldonadon de libroj. La unuaj estis porpacaj broŝuretoj kontraŭ milito kaj atom-bombo. Ĉar ankoraŭ estis ekonomie malfacila tempo post la milito, oni fondis kooperativon, Japana Esperanta Libro-kooperativo. Ĝi poste fariĝis eldona fako de KLEG, kiu preskaŭ ĉiujare konstante eldonas novajn librojn, jen lernolibron, jen facilan legaĵon, jen literaturaĵon, ktp.

Ni jene prezentas tiujn, kiujn oni nun povas aĉeti ĉe la libroservo de KLEG (prezo en japana eno). Bv. ankaŭ konsulti la retan katalogon de UEA.



Tradukitaj el la japana literaturo

- Postmilita japana antologio** 1500
Kolekto de 12 noveloj de elstaraj verkistoj: *Ooe Kenzaburô*, nobelpremiito, ka.
- Gooŝ, la 'ĉelisto** 1500
kolekto de fabeloj de *Miyazawa Kenzi*, trad. de *Nozima Yasutarô*.
- Nokto de la galaksia fervojo** 1400
- Kvar fabeloj de Miyazawa Kenzi** 1200
Ambaŭ estas kolektoj de fabeloj de *Miyazawa Kenzi*, trad. de *Konisi Gaku*.



- Vespera gruo** 300
Dramo de *Kinosita Zyunzi*, trad. de *Miyamoto Masao*.
- La 15a, marto, 1928** 500
Romano de *Kobayasi Takizi*, kontraŭreĝima verkisto, trad. de *Nukina Yosıtaka*.

Originalaj noveloj

- Vage tra la dimensioj** 700
Sciencfikcioj de *Konisi Gaku*.

Verkoj de Vasilij Eroŝenko


- Lumo kaj ombro** 500
Fabeloj kaj poemoj originale verkitaj en Ĉinio.
- La tundra ĝemas** 500
Rakontoj kaj poemoj originale verkitaj pri Siberiaj popoloj.
- La malvasta kaĝo** 500
Fabeloj tradukitaj el la japana.
- Stranga kato** 500
Fabeloj tradukitaj el la japana.
- La kruĉo da saĝeco** 800
Fabeloj originale verkitaj en Rusio.
- Cikatro de amo** 900
Fabeloj trad. el la ĉina traduko far *Lusin*.

Bildrakonto

- La Flambirdo** 1800
de *Tezuka Osamu*, trad. de *Konisi Gaku*.

Enigma

- Gimnastiko por cerbo** 400
50 matematikaj enigmoj kun solvoj.



Enigma (2)

TACUMI Hiroŝi

Kvin sinjoroj, nome *Abe, Egi, Ida, Oku* kaj *Uno*, apartenas al iu orkestro. Iliaj fakaj muzikiloj estas violono, harpo, fluto, korno kaj timpano. Tri el ili estas esperantistoj, dum la aliaj du ne. En la Universala Kongreso en Jokohamo tiuj tri esperantistoj volontule laboras pri akceptado, ĉiĉeronado kaj loĝigo respektive.

Surbaze de jenaj kvin informoj divenu, kiu sinjoro ludas kiun muzikilon, kaj kiu esperantisto volontulas en kiu laboro.


(1) El la 3 esperantistoj la plej nova estas tiu, kiu laboras pri loĝigo, kaj la dua nova estas tiu, kiu ludas fluton. La plej malnova estas s-ro *Ida*.

(2) S-ro *Oku* nun intencis eklerni Esperanton, instigita de la UK en Japanio. Pri tio li interkonsiliĝas kun tiu, kiu ludas harpon.

(3) La violonisto kaj tiu, kiu laboras pri loĝigo kune partoprenis en la lasta UK en Florenco.

(4) En la lasta jaro la timpanisto ĉeestis elementan kurson de Esperanto, kaj la antaŭlastan jaron s-ro *Uno*. Ili membriĝis al loka Esperanto-klubo tuj post la kurso, kaj decidis volontule labori en la UK en Jokohamo. Dume unu alia esperantisto estas membro de la klubo jam de antaŭ pli ol dek jaroj.

(5) El la 5 muzikistoj nur s-ro *Abe* kaj tiu, kiu laboras pri ĉiĉeronado, ankoraŭ ne havas sperton vojaĝi eksterlanden.



Verko por paco

Notoj pri la Delto 400
Travivaĵo de atombombita virino, trad. de *Konisi Gaku*.

Zamenhofaj

La revizoro 200
Paroladoj de d-ro L. L. Zamenhof 1000
Nova eldono kun suplemento
La gimnazio 700
Zamenhofa traduko kun japanlingva traduko.

Lerniloj por japanlingvanoj

Ekzercu vin en bazaj vortoj 1200
verk. de *Tani Hiroyuki*.

Esperanto tiel parolata 1000
verk. de *Huĝimoto Tacuo*.

Nova kurso de Esperanta Interparolo 1000
verk. de *Takeuti Yosikazu* kaj *Tani Hiroyuki*.

Facilaj legaĵoj

Ivan la malsaĝulo 900
Tradukita rakonto de *L. Tolstoj*.



50 Fabloj de Ezopo 800
Fabloj reverkitaj de *Nakagaki Kozirô*.

La krimo de Katrina 400

Vojaĝo kun Katrina 500

Katrina malfruas 500

Rakontoj originale verkitaj de *Sten Johansson*.



Enigmo (3)


Redakcio

Plenigu la kvadratetojn per po unu litero laŭ la donitaj ŝlosiloj. Tiam la sinsekvaj literoj en la helverdadaj kvadratetoj donos unu frazon, kiu estas la solvo de la enigmo.

Rim. (x) signifas, ke la vorto ne portas finaĵon. Mankas ŝlosilo por la vortoj en la trovota frazo.

Horizontale: 6. Esperanto estas lingvo ~ nur facila sed ankaŭ utila. (x) 8. ~o de ~o ne ĉiam estas ~o. (x). 11. agrablaodoro. (x) 14. Jen malnova ~o kovrita de musko. (x) 15. Tien kaj ~en svingiĝas la pendolo. (x) 16. ne havanta fakan scion. 19. Homoj spektas bestojn en ~o. Aŭ male. (x) 22. Ĉiu mano havas ~ kvin fingrojn. (x) 23. kemia elemento uzata en atombombo. (x) 25. objekto gardanta homon kontraŭ danĝero aŭ malfeliĉo. (x)

Vertikale: 1. nacia floro de Japanio. 2. Besteto kun longaj oreloj. 3. En certaj regionoj oni ~as mortintojn sen kremacio. (x) 4. Ho, ~ mi havus pli multan pension! (x) 5. Oni devas bremsi ~n por defendi pacon. 7. Fermu la ~on por ĉesigi la elfluon de akvo. (x) 9. frakcio kun numeratoro unu. 10. Patro estas malpli aĝa ol ~o, sed prapatro estas pli aĝa ol pra~o. (x) 11. la plej forta karto el la samkoloraj. (x) 12. Bone pripensu antaŭ ~ ekagi! (x) 13. novica soldato. 17. kronologia rakonto (ordinare uzata plurale). 18. Seka ~o estas malbona por niaj gorĝoj. (x) 19. Obio estas ~o por kimono. (x) 20. Oni uzas ~on kaj punkto~on por dividi frazpartojn. (x) 21. Manĝu ĝis vi estos tute ~. 22. Ĉiu dekstra ~o de *La Movado* estas



numerita per nepara nombro. (x) 24. Verso finiĝanta per senakcenta silabo estas nomata ~. 26. En frid~o oni konservas manĝaĵojn. (x) 27. Fulmo ~brilis kaj tondro ~sonis. (x)

Pri Enigmoj

Sendu viajn solvojn al la redakcio ĝis la fino de septembro, 2007. Ni publikigos la solvon de tri enigmoj en la novembro numero, kaj donos premion al tri el la solvintoj per lotado.

La Movado: KLEG, Sone-higasi 1-11-46-204, Toyonaka-si, Ōsaka-hu, JP-561-0802
kleg@mvf.biglobe.ne.jp

Redaktantoj: Konisi Gaku, Aikawa Setuko,

Mine Yositaka

Korektlegantoj: Kitagawa Syōzi, Konisi Tiyo,

Somekawa Takatosi, Tahira Masako

発行所: ラ・モバード社 編集: 小西 岳 発行人: 北 さとり 定価 280円 送料 60円 1年 3800円 送料共本局: 関西エスペラント連盟内 561-0802 豊中市曾根東町1-11-46-204

電話 (06) 6841-1928 ファクス専用 (06) 6841-1955 電子メール: kleg@mvf.biglobe.ne.jp

振替 00960-1-60436「関西エスペラント連盟」 ホームページ: http://www2u.biglobe.ne.jp/kleg/

九州支局: 九州エスペラント連盟内 840-0202 佐賀市大和町久池井1597-1 鶴木敬憲方 電話 (0952) 62-1341

中国四国支局: 中国四国エスペラント連盟内 734-0041 広島市南区黄金山町7-15 忍岡守隆方 電話 (082) 286-2745

苫小牧分局: 053-0844 苫小牧市宮の森2-18-18 星田 淳方 電話 (0144) 74-2539

横浜分局: 236-0017 横浜市金沢区西柴4丁目17-9 ドイ ヒロカズ方 電話 (045) 785-5458

東京分局: 185-0014 国分寺市東恋ヶ窪3-18-12 ヤマサキ セイコー方 電話 (0423) 21-1142

印刷人: 出口文堂 621-8686 京都府亀岡市古世町北古世82-3 株式会社 天声社